

La komenco de la unua mondmilito laŭ Louis Pergaud

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 581/91-1, 1982 majo 06 kaj 08.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-91/SRI-1982-91-1-581-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-komenco-de-la-unua-mondmilito-lau-Louis-Pergaud.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por la beletremuloj la jaro 1982 estas interalie la centjara jubileo de la franca verkisto Louis Pergaud, la aŭtoro de la Butonmilito. Kiel ni jam raportis, tiu ĉi libro aperos ĉijare en esperantlingva versio sub la formo de bele ilustrita grandformata volumo. Nuntempe la presprovaĵoj estas korektataj kaj mi estas verkanta postparolon pri la historia signifo de la verko, pri la vivo kaj literatura produkto de ties aŭtoro kaj pri lia militsperto, kiun konkludis la morto en 1915.

A.- La filatelistoj sciu, ke la francaj poŝtoj eldonis specialan poŝtmarkon honore al la centjara jubileo Louis Pergaud. Oni vidas sur ĝi tre belan portreton de tiu verkisto antaŭ malfermitaj libroj. Kaj la datoj 1882 - 1915 memorigas, ke Louis Pergaud estis unu el la viktimoj de la unua mondmilito je la aĝo de 33 jaroj.

Cl.- Per leteroj de Louis Pergaud oni povas kunvivi lian milit-partoprenon. Durn kelkaj elsendoj per citaĵoj el tiuj emociigaj korespondaĵoj, kiujn tradukis Roger bernard, ni malkovrigos al vi la sentojn de juna franco, kiu ĝis la lasta tago de sia vivo regule skribis al la edzino kaj al amikoj el la batalfronto, kie li konatiĝis kun realaĵoj, kiujn li nur mildige rakontis al sia karulino, por ke ŝia maltrankvilo ne tro kresku.

A.- La militdeklaro trovas la junan verkiston en Parizo, laboranta samtempe pri pluraj verkoj, kiel li skribas la 2-an de januaro 1914 al amiko. Ni citu lin:

Cl.- "Mi laboras samtempe pri pluraj verkoj : nova romano, Lebrac arbhakisto, sekvo al la Butonmilito ; kolekto de noveloj La Kamp-simpluloj, kiu entenos la pecojn, kiujn mi nun sendas al vi; fine tria libro: kroniko pri kampoj kaj arbaroj, ia familiar-ĝenra speco de novel-rememoroj kaj, kiel kutime, ne malmulte vort-aŭdaca. Aldonu al tio ne oficialan kunlaboron por kelkaj avangardaj gazetoj satiraj, artikolojn tie-tie, kaj aliajn laboraĵojn duonliteraturajn en sekretarieco aŭ korektado de manuskriptoj ; kaj ankaŭ, tamen, mian oficon; jen sufiĉe por plenigi miajn tagojn kaj ofte ankaŭ parton de miaj noktoj. Malgraŭ ĉio mi bone fartas kaj mi fidas je mia stelo."

A.- Estas fakte kun plena fido je sia stelo, ke Louis Pergaud forlasis Parizon por Verdun. Jen, per kelkaj leteraj citaĵoj, lia maniero travivi la ekmilitajn eventojn.

Cl.- La 27-an de julio 1914 li skribis al sia frato Lucien :

A.- Ĉar la novaĵoj estas ja alarmvekaj, kaj ĉar en okazo de milito jam la 2-an tagon matene oni sendos min al Verdun, mi zorgas iom anticipi la eventojn. Mi ja ne volus troviĉi en la talpolando ne antaŭkissinte vin, eĉ se nur perletere. Kaj unue, mi reiras al ĉi iom pesimistaj elvokoj, ĉar se la hieraŭa tago estis multe streĉeca, la hodiaŭa lasas iom pli trankviligan impreson, kaj mi volas ankoraŭ esperi, ke ni estos kvitaj kun nur la timo, se supozi, ke ni timis..."

Cl.- Kvin tagojn poste li skribas al sia bopatro, ĉiam el Parizo.

A.- Estas la sabato 1-a de aŭgusto 1914.

Cl.- "Estas certe, ke niniam la situacio estis tiel streĉa kaj minaca. Aldone al la malfeliĉaĵo, krimulo, aĉa rojalisto, stulta kanajlo, murdis hieraŭ vespere Jaures, pafante al li tri revolver-kuglojn, de malantaŭe. Intensa estas la emocio, ĉar, en tiu inda civitano, ja la plej bona el la homoj, kaj la plej inteligenta el la patriotoj, malaperas unu el la plej trafaj avertantoj por la franca popolo, kaj unu el la plej akraj gardantoj de la paco en la mondo. Jen krimo plej hontinda, kiu min skuegas kaj indignigas. Neniam antaŭe, en kriz-epokoj, kia la nun travivata, oni tiel multe sentis la bezonon kunteniĝi; kaj ĝuste en la momento, kiam la socialista partio, dum ĝi fortege strebas por la paco, ankaŭ nete solidariĝas kun la cetero de la nacio kaj flankenmetas la politikajn malamojn, jen iu fie murdas ĝian multamatan estron. Jen pravigo por kriegi, ne tiel kontraŭ la idioton, kies mano agis, kiel kontraŭ la malkuraĝajn provokantojn, kiuj en aĉaj ĉantaĝaj gazetoj dissemas la plej abomenindajn kalumniojn kontraŭ la honestajn homojn, kaj instigas la spirit-malriĉajn al agoj tiel teruraj kiel tiu ĉi."

A.- Ĉiam al sia bopatro, Louis Pergaud reskribis la postan tagon.

Cl.- Estas la dimanĉo 2-a de aŭgusto 1914.

A.- Morgaŭ matene, je la 8-a, kiel ordonas mia mobiliz-libreto, mi foriros al Verdun. La pariza popolo staras trankvila; ĉiu firme decidis agi laŭdeve: socialistoj, sindikatisoj, kaj anarkiistoj ekmarŝos... Mi havas ankoraŭ multe por diri, karaj parencoj, kaj mi ne scias, kiel komenci. Ĉio kirliĝas, kaj ni travivas horojn de ekscitiĝo kaj febro. Ĝis baldaŭ, mi esperas. Laŭaserte, ĉio estus finita post ses semajnoj; sed ĉu eblas scii?..."

Cl.- Kaj jen tre signifa letero de la sama tago al verkista kolego :

A.- "Adiaŭ, ferioj ! Al Verdun unue mi foriros morgaŭ, por senpaga vojaĝo. Sciu, mi volonte ekiras! La eventojn mi observis, ja ne senfebre, sed kun multe da trankvilo, kaj malvarmsange. La pacon pasie ni deziris, sed la militon Berlin volas. Mi neniam submetiĝos al la boto de 1' Kaiser!"

Cl.- Plenfida je la praveco de Francio kaj la malpraveco de Germanio estis Louis Pergaud.

A.- Jen tiurilate, ĉiam de la sama tago, 2-a de aŭgusto 1914, tre karakteriza letero sendita al amiko :

Cl.- Jen nun okazis, kaj morgaŭ matene mi ekiros al Verdun, kien mia mobilizfolio vokas min por tempa "vojaĝrestado". Mia edzino, kvankam tre malgaja, kun rezignacio kaj kuraĝo eltenas tiun afliktaĵon, kaj mi, se ne temus ke mi devas lasi ŝin sola ĉi tie, ĝoje forirus. Kiel ĉio stas digne kaj grave! Mi estas profunde emociita, kaj mi fidis. Neniam la aferoj prezentiĝis tiel oportune: ĉe nia flanko, ni posedas unue la pravon, niajn kanonojn, kaj la anglan ŝiparon. Kaj ankaŭ la fidon, kaj tiun praamon al la franca tero, ĵus ekŝprucintan, puran kaj brilegan, el ĉiu loko. Sed ne konvenas nun fajli belajn frazojn: necesas nur simple fari sian devon, kaj tion ni faros."

A.- Al sia edzino Louis Pergaud skribis la 3-an de aŭgusto 1914:

Cl.- "Regas granda interfrateco. La oficiroj kaj la trupanoj familiare konversacias. Kontraŭ Vilhelmo II-a estas senlima malamo, kaj ja, se ni tien envenos, povos okazi por li kaj lia popolo iom da perturbo... Nunmomente ni vivas la kazern-vivon, ja ne malagrablan. Mi havas

liron, kaj mi tre bone dormis. Kvietiĝu do, nenia danĝero, kaj antaŭe ni estas eksterordinare protektitaj. Se la tempo estos ne bona por ni, ĝi estos la sama por tiuj malindaj de Wilhelmo kaj mi estas certa, ke ĝin ili ne same kuraĝe eltenos kiel a filoj de Francujo"

A.- La venontan semajnon, ĉiam per citaĵoj el leteroj de Louis Pergaud, ni intimiĝos kun la spiritostato de la francaj soldatoj komence de la unua mondmilito.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*